Sci. Rev. 47 (1996)(2)

# KULTURO : VALORO AU VARO ?

Pri la Kongresa Temo 1996 en Prago

Gilbert R. LEDON (BR)

Se kulturo estas la 'prizorgado kaj perfektigado de la spirita evoluo de homo per racia edukado' (PIV), tiu kulturo nur povas esti valoro, ĉar temas pri tio, kiun la homoj libere kaj individue juĝas morale kaj estetike grava.

Cicerono antau du mil jaroj diris, ke senkultura homo estas sklava besto. Sed la sistemoj, kiujn la homoj ekde tiam en realo establis, klopodis uzi la kulturon kiel artiklon, kiel objekton au varon cele al kondiĉigado de la homa spirito ne per racia edukado, sed per mistikaj paraboloj, per subjektivaj alegorioj au per aliaj ideologioj preter la homkonformeco.

Mi demandas, ĉu inter aliaj dogmoj kaj mitoj la sanktaj biblioj kaj noblaj koranoj ne estas de pli ol du mil jaroj la plej autentika ekzemplo de varo, kiu trudas kulturan formon, por ke la homo restu sklava besto?

Kulturon, kiel valoron, la homo nur povas atingi per libera kleriĝo, t.e. per individua kapablo ĝuste uzi la akiritajn sciojn por klare juĝi kaj bone taksi la aferojn, el kiuj konsistas nia vivo. Nur tiam la arta esprimado de tiu kulturo fariĝas konforma al la homa manifestiĝo.

Ne povas esti ĝuste unika pensado, ununura kultura gvidlinio. En kultura valoro povas ekzisti nek dioj, nek estroj, ĉar tiam la kultura valoro transformiĝas en varon kaj transformas nin en sklavojn, kies kultura valoro neniiĝas.

Ni, esperantistoj, devus scii, ke kulturo ne povas esti varo.

Miaj ĉi-temaj kolegoj prezentis precipe la kulturaĵojn kiel varojn. Sed kulturaĵoj tamen estas fruktoj de la kulturo t.e. manifestiĝoj de spi-





Sci. Rev. 47 (1996)(2)

rita evoluo per racia au eble ankau malracia edukado. Estas do la homa menso, kiu gvidas, au devus gvidi, la homajn manojn, kiuj produktas la eventualajn kulturaĵojn, la varojn - valoraj au ne. Sekve, kulturo estas valoro kaj morale kaj estetike grava, kiu ne povas esti negocebla, aĉetebla kiel varo.

Varoj, kiel esprimado de kulturo, ne povas konsistigi la kulturon mem; tiuj varoj montriĝas, en la nuna stato de nia civilizacio, eĉ danĝeraj por nia kulturo kaj monda civilizacio, precipe kiam temas pri klerigo per tiuj varoj. Ĉu necesas ripeti, ke la gazetaro, televido kaj ĉiuj t.n. informadoj, perkomputile kompilitaj, ja povus klerige instrui la homamasojn, sed en la realo oni konstatas manipuladon kaj kondiĉigadon de la homaj mensoj por direkti ilin lau interesoj, kiuj malmulte rilatas al kulturo.

Ĵak Le Puil, la kunordiganto de la Kongres Temo, diras, ke ni homoj rajtas al kulturo, ke ni ankau rajtas malakcepti kaj rifuzi la cititan manipuladon kaj la kondiĉigadon; sed por tion fari, en la intereso atingi kulturon, necesas, ke ni estu liberaj kaj senkatene povu taksi la varajn kulturaĵojn lau vara au valora karaktero.

Kaj jen la demando, *ĉu povas ekzisti kulturo en totalismaj landoj?* Ĉu mi ne ĵus montris, ke autentika kulturo nur povas aperi en plena libereco, ke ĝuste la totalismoj, diktaturoj, despotoj nuligas, neniigas la liberecon decidi pri la ofertitaj kulturaĵoj, por ke ni iĝu, kiel diris Cicerono, sklavaj bestoj?

Sendube, la totalismoj servas nin per kulturaĵojn, per varoj, multaj varoj; ili plenigas niajn trogojn per multaj furaĝoj (kiom da mensaj furaĝoj estas en ĉi tiu kongreso mem?), tiel ke ni restas sklavaj bestoj kiuj glutas, beste glutegas la furaĝon ne por vivigi kulturvalorajn mensojn, sed por nutri niajn korpojn de ekspluatataj servutuloj ene de la sistemoj varoplenaj.

Yamasaki Seiko, en la antaua sesio, sufiĉe longe elmontris la kulturajn varojn de Markso, kiujn oni provis vendi, tro multekoste vendi, dum la lastaj sepdek jaroj de nia homa historio. La iluziaj muroj falis, ĉar la mito pri kolektiveco, kiu trompis la homaron ĝuste dum tiu jarcento, kondukis al la plej detrua totalismo de la lastaj jarcentoj depost

la revolucio de 1789 - kaj jen, la homoj ne konsciiĝis, la homoj ne konsciis ke muroj, burokrataj stampoj, leĝoj kaj senfinaj sistemoj estas obstakloj por la funkciado de libereco, kaj jen, en tiuj samaj landoj la nepensantaj popolamasoj pretas, 'demokratie' reinstali la despotojn, la carojn, pro persona konveneco kaj - ironio de nia destino - por plenigi siajn trogojn de servutuloj.

Kaj ĵak Le Puil demandas, *ĉu demokratio garantias kulturon?* Lau tia evoluo - evidente ke ne! Demokratio, lau difino, en la esenco de la signifo, estas regado de la popolo per la popolo. Kaj el kiu konsistas la popolo? Ĉu vi tion volas au ne, popolo konsistas el individuoj, el ĉiu el ni ĉiuj. Sekve, por ke demokratio estas efektiva kaj reala, necesas, ke ĉiu individuo regu sin mem, ke ĉiu individuo en nia socia ordo estu memstara, mempensa, memaga kaj ne submetiĝu al la regado de aliaj, de dioj, de estroj, de pliaj reĝoj au de sorĉistoj, kiel diris Majorie Boulton ĵus en sia prelego "La proceso, la sorĉistino kaj sia kato".

Por plena demokratio ne estas alia solvo ol individua memregado. Ni, ĉiuj homoj, ĝuste per individua kleriĝo kaj kulturiĝo devas havi la sufiĉan volforton por atingi tian staton de libereco, kiu, kiel diris same Proudhon[1] kiel Reclus[2], estas la maksimuma ordo.

Sed jen, nuntempe post la glutado de tiom da furaĝo, la famaj vortoj anarkio kaj memregado ne signifas maksimuman ordon, sed ĝuste kaoson, malordon. Kial? Ĝuste ĉar ni nin lasas kapti de la falsa, placeba demokratio kiu envolvas nin. En la praktiko, kiam la sistemoj postulas, ke ni agu 'demokratie', ni nur elektas nian konduton inter tiuj 'veraj veroj', la dogmoj, la doktrinoj, ideologioj, mitoj de partioj, de truditaj sistemoj, kiuj sklavigas nin de du mil jaroj, kaj tio eĉ kiam la modernaj komputiloj, komputeroj, komputoroj intervenas por liveri al niaj mensoj la informojn pri la varaj kulturaĵoj ŝatataj de la amasoj. La informoj ne

---

1 Pierre Jos. Proudhon, 1809 - 1865, deputito de 1848;
*"Qu'est-ce que c'est que la propriété - ou: Recherche sur le principe du droit et du gouvernement"*, 1840, › *"La propriété, c'est le vol."*

2 Elisée Reclus, 1830 - 1905, membro de la Pariza Komunumo de 1871;
*"L'évolution, la révolution et l'idéal anarchiste"*, 1897.

(Rim. de la redaktanto)



celas la kulturon, sed negoceblajn varojn kiel kokakolaon, futbalon au pliajn olimpikajn ludojn.

En tiaj cirkonstancoj la nura vorto 'demokratio' ne povas garantii autentikan homkulturon.

Adreso de la autoro:
Gilbert René LEDON
C.P. 269
BR - 12460-000 Campos do Jordão
BRAZILO

(La 'kongreso' koncedis al la 'Kongresa Temo' 2 horojn.- La redakcio de SR pretas disponigi al tiu temo du au tri kontribuojn; ĉi tiu estas la unua, kiu rilatas al la unuhora vendreda kunsido kun la titolo: 'La rajto je kulturo' kun jenaj du subtitoloj: 'ĉu povas ekzisti kulturo en totalismaj landoj' kaj 'ĉu demokratio garantias kulturon.'

Ni dankas al S-ro Ledon por la disponigo de la manuskripto post la prelego. Nia revizianto de la artikolo faris tiom multajn parte necesajn piednotojn, ke ni forlasis ĉiujn 16 instigante lin verki propran artikolon.

Tamen kelkaj rimarkoj: la nocio kulturo (lau PIV) ŝajnas esti akceptebla nur kiel kreanta procezo en historia, dinamika senco, kiu ne nur plivalorigas, sed ankau detruas. Arto videbligas kulturan evoluon. Kulturaĵo (*ge. Kulturgut*) estas plivalorigita statika produkto, t.n. kulturheredaĵo, objekto au idolo de pasinta kultura aktiveco - varo kun valora aspekto (kvazau kiel 'interna ideo')?.

Sed el kiuj premisoj rezultas la konkludo, ke ekzistu 'rajto je kulturo'?

Lau reale ekzistanta kapitalisma vidpunkto fakte validas:

*La vera valoro estas la varovaloro*, au kun aliaj vortoj: ĉio estas varo.-

*La kulturo devas forlasi sian varokarakteron por estiĝi kulturo.*
Berthold Brecht

Rimarkoj de la redaktanto).